



Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 35 (kvara serio), numero 4 (137), 2026
ISSN 1385-2191

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ♦ @CED_interling

Redaktas

Başak ARAY  ♦ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ) 
Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ♦ Alessandra MADELLA 
Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

I	Eventoj	3
1	Simpozio okaze de la eldono de nova japana traduko de «La danĝera lingvo», 2026-04-24	3
1.1	Organizantoj	3
1.2	Loko	3
1.3	Priskribo	3
1.4	Programo	3
2	Simpozio pri scienco kaj paco, 2027-05-10 –14	3
2.1	Organizantoj	3
2.2	Loko	4
2.3	Priskribo	4
3	1-a Internacia kolokvo pri interlingvistiko kaj esperanto-studoj: Al esploragendo por Kolombio, 2026-11-13 – 14	4
3.1	Organizantoj	4
3.2	Loko	4
3.3	Priskribo	4
II	Universitata kaj esplora agado	7
1	Esplorado pri la historio de la esperanto-movado ĉe Universitetet i Bergen	7
III	Kulturo	8
1	Interlingvistika kajero de «La Ondo de Esperanto»	8
1.1	Enhavtabelo	8
2	«Cinema Esperanto» en Bukareŝto	8
IV	Personoj	9
1	Alessandra Madella eniras la redakcion de Ipi	9
2	Hans Michael Maitzen, 1943 – 2026	9

V Bibliografiaĵoj	11
1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj	11
2 Fakrevuaj artikoloj	11
3 Libroj	11
4 Libroĉapitroj	11
5 Revu-numeroj	12
5.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik	12
5.2 Language Problems and Language Planning	12
5.2.1 Language Problems and Language Planning, 50:2 (2026). ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.	12
5.2.1.1 Enhavo	12
5.3 Esperantologio / Esperanto Studies	14
5.4 Investigationes Linguisticae	14
5.5 Beletra Almanako	14
5.6 Literatura Foiro	14
6 Novaĵleteroj	14
6.1 Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)	14

I EVENTOJ

1 SIMPOZIO OKAZE DE LA ELDONO DE NOVA JAPANA TRADUKO DE «LA DANĜERA LINGVO», 2026-04-24

1.1 *Organizantoj*

Europa instituto de Sophia-Universitato kunlabore kun Japana Esperanto-instituto kaj la eldonejo Kokusho Kankokai

1.2 *Loko*

上智大学 [Sophia-Universitato], Tokio, Japanio

1.3 *Priskribo*

La 24-an de aprilo 2026 okazis simpozio okaze de la eldono de nova japana traduko de *La danĝera lingvo*; vidu ankaŭ sekcion V.3 de tiu ĉi kajero de IpL.

1.4 *Programo*

KIMURA Goro Christoph: *Saluto de la organizantoj*

Ulrich LINS (tradukis USUI Hiroyuki): *Saluto de la aŭtoro*

ISIKAWA Takasi, AIKAWA Takuya, YOSHIDA Naoko, USUI Hiroyuki: *Parolado de la tradukintoj*

HIRAIDE Takasi (emerita profesoro de Tama Universitato pri arto): *Prelego 1*

NUMANO Kyoko (emerita profesoro de Tokia Universitato pri Fremdaj Studoj): *Prelego 2*

YAN I (profesoro de Nihon-Universitato): *Prelego 3*

Diskuto

2 SIMPOZIO PRI SCIENCO KAJ PACO, 2027-05-10 –14

2.1 *Organizantoj*

La section Histoire du monde moderne, de la révolution française et des révolutions du Comité des travaux historiques et scientifiques (CTHS)

2.2 Loko

Lyon, Francio

2.3 Priskribo

La 151-a nacia kongreso de la historiaj kaj sciencaj socioj: la paco (151e congrès national des Sociétés historiques et scientifiques : la paix) pritraktos multajn temojn rilate mondan pacon. El la multaj menciitaj faktoroj, kiuj gravas por paca mondo, ankaŭ interlingvistiko estas menciita en la priskribo:

[...] Esperanto estis kreita en 1887 de L. L. Zamenhof, kaj la Universala Esperanta Asocio estis fondita en 1908 [...]. Sciencistoj, precipe matematikistoj, pledis por ĉi tiu lingvo, kiu celis faciligi komunikadon kaj kreskigi interkomprenon, kiu transiris limojn. Aliaj internaciaj lingvoj ankaŭ estis kreitaj, kiel ekzemple Ido [...]. Tamen, la deziro pri internaciismo de scio (kaj tial komuna lingvo, libera de naciismo) ne nepre estas ligita al pacifismo, kiel montras la sinteno de pluraj sciencistoj dum la Malvarma milito. Aliaj movadoj post la Dua mondmilito do devas esti konsiderataj [...].

Pliaj informoj troviĝas [ĉi tie](#).

3 1-A INTERNACIA KOLOKVO PRI INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTO-STUDOJ: AL ESPLORAGENDO POR KOLOMBIO, 2026-11-13 – 14

3.1 Organizantoj

Universidad Nacional Abierta y a Distancia (UNAD), Escuela de Ciencias de la Educación (ECEDU), Grupo de Investigación VIRTUALEX kaj Kolombia Esperanto-Ligo (KEL)

3.2 Loko

Bogotá D.C., Kolombio

3.3 Priskribo

La celo estas la konstitudo en Kolombio de linio de akademia laboro pri interlingvistiko kaj esperanto-studoj per nacia kolokvo de formiga esplorado, kiu identigu kaj prioritatigu la esplorproblemojn de la kampo.

Por tiu celo oni pritraktos kvar temarojn:

1. Scienca statuso de interlingvistiko kaj ĝia foresto en la kolombia akademia agendo

- Oni ekzamenas, kiajn demandojn formulas interlingvistiko, per kiaj metodoj ĝi pritraktas ilin kaj kiajn rezultojn ĝi produktis kaj kial tiu kampo ne ĉeestis en la kolombia eduka kaj lingvistika esplorado. Interesas ankaŭ la historio de la esperanto-movado en Kolombio kiel objekto de dokumenta reakiro.
- Manko, kiun oni celas dokumenti estas la neekzisto de kolombia linio, grupo aŭ programo dediĉita al la kampo, kaj foresto de inventaro de primaraj fontoj pri la historio de esperanto en la lando kun subtemoj:
 - Koncepta limigo: interlingvistiko, planlingvoj kaj interlingvistikaj studoj en larĝa senco
 - Akademia infrastrukturo de la kampo: recenzataj revuoj, katedroj kaj programoj; ilia institucia malfortikeco
 - Historio de la Esperanto-movado en Kolombio: arkivoj, fontoj kaj dokumentaj mankoj
 - Kriterioj por distingi recenzitan literaturon de aktivisma popularigo en ĉi tiu kampo

2. Evidenteco pri la lernado de esperanto kaj la t.n. propedeŭtika valoro

- Oni kritike revizias la empirian literaturon pri tio, ĉu antaŭa instruado en planlingvo kun regula gramatiko favoras la postan lernadon de naturaj lingvoj.
- Manko, kiun oni celas dokumenti estas la distanco inter la kredo disvastigita en la Esperanto-movado kaj la reala stato de la recenzita evidenteco; foresto de ajna studo en hispanlingva aŭ kolombia kunteksto. Temoj pritraktotaj:
 - Sistema revizio de la propedeŭtika literaturo kaj de ĝiaj metodologiaj limoj
 - Metalingva konscio kaj transigo en la lernado de duaj lingvoj
 - Dezajno de realigebla propedeŭtika studo en kolombia kunteksto: populacio, kontroloj kaj instrumentoj
 - Analizo de la cirkulado de nekontrolitaj asertoj en la populariga literaturo de la kampo.

3. Perata lernado kaj virtualaj komunumoj en lingvoj sen teritorio

- Oni pritraktas esperanton kiel kazon de instruata akirado tute subtenata de pedagogia perado kaj de komunumo, sen teritorio de mergiĝo kaj ekzamenas la historiajn formojn – lernolibro, registrita kurso, radio – kaj la nuntempajn, same kiel la generacian dividon inter cifereca komunumo kaj ĉeesta asocia komunumo.
- Manko, kiun oni celas dokumenti estas la foresto de recenzitaj studoj pri la didaktika efikeco de la ciferecaj platformoj por instruado de esperanto, kaj foresto de akademia historio de ĝia distanca instruado. Temoj pritraktotaj:
 - Instrudezajno kaj skafaldado sen mergiĝa kunteksto
 - Daŭrigo de la motivado kaj forlaso en la memstara reta lernado
 - Virtualaj praktikkomunumoj kaj konstruado de lingva aparteno
 - Transigo de ĉi tiuj trovoj al la dezajno de la virtualaj lingvoprogramoj de la universitato

4. Lingva justeco, denaskaj lingvoj kaj dulingveca politiko en Kolombio

- Oni dialogigas la literaturon pri lingva justeco kaj lingvoekonomiko kun la kolombia kadro: la 68 agnoskitaj denaskaj lingvoj kaj la Dekjara plano pri denaskaj lingvoj, la Leĝo 1381 de 2010, la artikoloj 55 ĝis 58 de la Leĝo 115 de 1994 kaj la superrege anglalingva orientiĝo de la dulingveca politiko.
- Manko, kiun oni celas dokumenti estas malabundo de analizoj, kiuj taksu la kolombian dulingvecan politikon el la kadroj de lingva justeco, kaj foresto de laboroj, kiuj ligu tiun diskuton kun la denaskaj lingvoj kaj kun la planlingvoj. Pritraktotaj temoj:
 - Lingva justeco: modeloj de distribuo de la kostoj por lerni komunan vehiklan lingvon
 - La kolombia dulingveca politiko en la lumo de la kadroj de lingva justeco
 - Denaskaj lingvoj kaj lingvaj rajtoj: efektivigo de la Leĝo 1381 de 2010
 - Lingvo, identeco kaj aparteno en neteritoriaj parolkomunumoj

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 ESPLORADO PRI LA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO ĈE UNIVERSITETET I BERGEN

Marcus Colla, Gates Cambridge Scholar de 2015 kaj nun lektoro pri Moderna eŭropa politika historio ĉe la Universitato de Bergen en Norvegio, dediĉas gravan parton de sia nuna esplorado al la historio de la esperanto-movado. Lia esplorado konsistas el du libroprojektoj: pli vasta historio, en kiu esperanto estas uzata kiel lenso por esplori la rilaton inter lingvo kaj identeco en la moderna mondo, kaj pli detala arkiva studo pri la esperanto-movado en Orienta Eŭropo post 1945.

Precipe interesa estas lia rigardo al la dekmiloj da esperantistoj en Orienta Eŭropo, kiuj post la Dua mondmilito uzis esperanton por komuniki trans naciaj kaj kontinentaj limoj kaj kreis retojn de korespondado kaj interŝanĝo. Laŭ Colla, esperanto povas helpi nin kompreni la interagon kaj streĉitecojn inter malsamaj formoj de internaciismo: unuflanke tiuj gvidataj de ŝtatoj kaj politikaj sistemoj, kaj aliflanke tiuj naskitaj de bazaj, libervolaj iniciatoj de homoj. Ĉi tio estas interesa memorigilo, ke esperanto ne estas nur lingvo, kiun homoj lernas aŭ uzas. Ĝi ankaŭ estas historia fenomeno, socia movado kaj interesa fenestro al la maniero, laŭ kiu homoj trans lingvaj kaj politikaj limoj kreis internaciajn rilatojn.

Indas legi kaj sekvi la laboron de Marcus Colla – kaj ĝoji, ke la historio de esperanto estas esplorata en tia serioza akademia kunteksto.

Pliajn informojn pri Gates Cambridge kaj la projektoj de Marcus Colla oni povas trovi [ĉi tie](#).

Ahmad MAMDUHI (Teksto iom redaktita).

III KULTURO

1 INTERLINGVISTIKA KAJERO DE «LA ONDO DE ESPERANTO»

La somera eldono de *La Ondo de Esperanto* (2026, n-ro 328) estas dediĉita al interlingvistiko kaj esperantologio.

1.1 *Enhavtabelo*

Akademio de esperanto: *Pri la esprimo «tiel nomata»*

Probal DASGUPTA: «*Mi akuzativas...!*» *diris Émile Zola*

Sabine FIEDLER: *Novaj esploroj pri konstruitaj lingvoj*

Christopher GLEDHILL: *Hazardaj kaj intencaj paronimoj: la rolo de paronimio en Esperanta vortfarado kaj terminologio*

Redakcio: *Esperantologio / Esperanto Studies*

Ilona KOUTNY: *Loko kaj enhavo de esperantologio fone de interlingvistiko*

Marc van OOSTENDORP: *Eviti rimon en Esperanta prozo*

Aleksander KORJENKOV: *La Ondo de . . . Esperantologio*

Ryszard ROKICKI: *Rimarkoj pri interpretoj de la Fundamento*

Klaus SCHUBERT: *Hugo Schuchardt, frua interlingvisto*

Halina GORECKA, Aleksander KORJENKOV: *Interlingvistiko kaj esperantologio en «La Ondo de Esperanto»*

Halina GORECKA, Aleksander KORJENKOV: *Interlingvistiko kaj esperantologio en «Ruslanda Esperantisto»*

Redakcio: *UK-III: La 48-a Esperantologia Konferenco*

2 «CINEMA ESPERANTO» EN BUKAREŜTO

En Bukareŝto oni lanĉis novan filmserion titolitan *Cinema Esperanto*, dediĉitan al plurlingveco, kultura diverseco kaj interkultura dialogo pere de filmo. Vidu pli [ĉi tie](#)

IV PERSONOJ

1 ALESSANDRA MADELLA ENIRAS LA REDAKCION DE IPI

Ni fieras pri la bonvenigo de Alessandra Madella al la redakcio de IPI. Ŝi studis japanan lingvon kaj literaturon kaj doktoriĝis pri komunikaj studoj. Nun ŝi profesoras pri interkultura komunikado kaj esperanto ĉe 枣庄学院 (*Zaozhuang-a Universitato*). Ŝi ankaŭ estas vicprezidanto de *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* (ILEI).

2 HANS MICHAEL MAITZEN, 1943 – 2026



Fotis Stella Maitzen

En 2026-07-14 post kelkara malsano profesoro Hans Michael Maitzen mortis en Vieno.

Profesie Maitzen estis astronomo ĉe la universitato de Bochum (1969 – 1976) kaj poste ĉe la universitato de Vieno. Li ankaŭ reprezentis Aŭstrion ĉe la *Eŭropa suda observatorio* en Ĉilio.

Li multe aktivis en la esperanto-movado; inter alie li organizis la simpozion *Esperanto 100-jara* en la jaro 1987 kaj estis prezidanto de la Loka kongresa komitato de la 77-a Unversala kongreso de esperanto en Vieno en la jaro 1992. Li profesoris ĉe la *Akademio internacia de la sciencoj* (AIS) kaj estis ties prezidanto 2013 – 2016.

Li kunlaboris en la dua eldono de PIV pri astronomio. Kune kun Reinhard Föbmeier li esperantigis kelkajn scienc-historiajn librojn: *La gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj* (2019), *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado* de Ludwig Boltzmann kaj en 2024 la fundamenta verko de Nikolao Koperniko *De revolutionibus orbium coelestium / Pri la revoluoj de la ĉielaj korpoj*. Li ankaŭ kunlaboris en aliaj tradukadoj, ekzemple *Kontraŭ milito. La kuraĝo konstrui pacon* de papo Francisko (2025).

Literaturo

- BOLTZMANN, Ludwig (2021). *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado / Reise eines deutschen Professors ins Eldorado*, esperanto kaj germana. Tradukis de la germana Hans Michael MAITZEN. Kun komentoj de Hans Michael MAITZEN kaj Renardo FÖSSMEIER [Reinhard FÖßMEIER]. Prago/Prag: Kava-Pech. ISBN: 9788088326199. [Traduko kaj reeldono de: Ludwig BOLTZMANN. «Reise eines deutschen Professors ins Eldorado», germana. En: *Populäre Schriften*. Leipzig: Johann Ambrosius Barth, 1905. Ĉapitro 23: 403–435.]
- FÖSSMEIER, Renardo kaj Hans Michael MAITZEN [Reinhard FÖßMEIER kaj ...] (2019). *La gregoria kalendara reformo kaj ĝiaj postefikoj*, Prago: Kava-Pech.
- FRANCISKO, [Jorge Mario BERGOGLIO] (2025). *Kontraŭ milito: La kuraĝo konstrui pacon*, Romo: IKUE. ISBN: 9788894760644. [Traduko de: FRANCESCO (Jorge Mario BERGOGLIO). *Contro la guerra: Il coraggio di costruire la pace*, itala. Città del Vaticano: Libreria Editrice Vaticana, 2022. ISBN: 9788828210412.]
- KOPERNIKO, Nikolao [Niklas KOPERNIGK] (2024). *Pri la revoluo de la ĉielaj korpoj / De revolutionibus orbium coelestium*, esperanto kaj latina. Tradukis de la latina kaj komentis, kun enkonduko, Hans Michael MAITZEN kaj Renardo FÖSSMEIER [Reinhard FÖßMEIER]. Prago: Kava-Pech. [Traduko kaj reeldono de la unua libro de: Nicolaus COPERNICUS (Niklas KOPERNIGK). *De revolutionibus orbium coelestium. Libri vi*, latina. Nurimberga [Nürnberg]: Ioh[annes] Petreius, 1543.]

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 DISERTACIOJ KAJ DIPLOMLABORAĴOJ

2 FAKREVUAJ ARTIKOLOJ

3 LIBROJ

LINS, Ulrich (2025). 危険な言語。エスペラント弾圧と迫害の歴史 (*La danĝera lingvo: La historio de la subpremado kaj persekutado de esperanto*), japana. Tradukis 石川尚志 [Takashi ISHIKAWA], 佐々木照央 [Teruo SASAKI], 相川拓也 [Takuya AIKAWA], 吉田奈緒子 [Naoko YOSHIDA] kaj 臼井裕之 [Hiroyuki USUI]. 東京 [Tokio]: 国書刊行会 [Kokushokankokai]. ISBN: 978-4-336-07790-5. [Traduko de: Ulrich LINS. *La danĝera lingvo: Studo pri la persekutoj kontraŭ esperanto*, 2-a eldono. Rotterdam: UEA, 2016. ISBN: 978-92-9017-128-7. (Originale eldonita kiel: Ulrich LINS. *La danĝera lingvo: Studoj pri la persekutoj kontraŭ esperanto*. Gerlingen: Bleicher-Eldonejo, 1988.)]

4 LIBROĈAPITROJ

ARAY, Başak (2026). «Planned languages: Esperanto and Basic English», angla. En: *Carnap-Handbuch: Leben – Werk – Wirkung*. Redaktis Christian DAMBÖCK kaj Georg SCHIEMER. Berlin: J. B. Metzler. Ĉapitro 9: 55–60. ISBN: 978-3-662-72936-6. DOI: doi.org/10.1007/978-3-662-72937-3.

Planitaj lingvoj: Esperanto kaj Basic English

En la frua dudeka jarcento aperis la movado por internacia helplingvo, celanta la kreadon kaj universalan adopton de lingvo alia ol iu ajn nuna lingvo uzata kiel gepatra lingvo. La defendantoj de la internacia helplingvo zorgis pri la reganta lingva baro, kiu malrapidigas komunikadon kaj komprenon inter homoj el diversaj landoj. Ili estis inspiritaj de la progresoj en telekomunikado kaj transportado, kaj ankaŭ de la kreskanta internacia kunlaboro en scienco, politiko kaj komerco, kies aparta manifestiĝo estis la klopodoj pri normigado.

5 REVU-NUMEROJ

5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

5.2 *Language Problems and Language Planning*

5.2.1 *Language Problems and Language Planning*, 50:2 (2026). ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.

5.2.1.1 *Enhavo*

- Ikhlās Gherzouli: *Breaking the sign code: How Algerian healthcare professionals weaponize English against Arabic-only mandates*

Rompi la signokodon: Kiel alĝeriaj sanprofesiuloj armiligas la anglan kontraŭ nur-arabaj mandatoj

La nuna studo ekzamenas kiel sanservaj profesiuloj en El-Eulma, Alĝerio, konstruas profesiajn identecojn samtempe rezistante lingvopolitikajn limigojn per konscie trapensita riskado. Malgraŭ la deviga arablingva afiŝado, 34 el 113 klinikoj (30.1%) uzas nomojn en la angla, riskante devigan fermiĝon. Per uzo de interpretivista aliro, tiu ĉi kvalita esplorado kombinas analizon de la lingva pejzaĝo kun intervjuoj kun ĉiuj praktikantoj kiuj alprenis la anglan, plus 30 pacientoj kaj unu eksperta praktikanto. La angla funkcias kiel simbola kapitalo, subtenante kvin diferencigajn strategiojn: personajn identigilojn (41.2%), estetikajn promesojn (32.4%), kvalitan lokadon (17.6%), profesion antaŭenigon (8.8%), kaj signaladon de moderneco (5.9%). Virinaj praktikantoj estas superreprezentataj (70.6%), kio respegulas nuancitan reziston. La studo enkondukas la kadron de Laŭregulaj kontraŭ Laŭpreferaj Signoj, proponante lingvopejzaĝan teorion por politike limigitaj kunteksto. La esploraj eltrovoj montras reguligan semiotikon – utiligon de simbolaj rimedoj ene de instituciaj limoj. Kvankam la araba dominas en klinika komunikado, pli junaj pacientoj ligas la anglan al internaciaj normoj, tiel kreante generacian tavoligon. La eksperta kazo montras adaptan obeadon: arablingvan afiŝadon kun, ene, la angla — tiel prezentante agantecon kiel strategian reziston.

- Qiang Zhang: *Incrementalism in Post-Colonial language planning: Policy evolution in Vietnam (1945–present)*

Laŭgradismo en post-kolonia lingvoplanado: Politikevoluo en Vjetnamio (1945–nun)

Tiu ĉi studo aplikas la laŭstadiisman teorion de Lindblom por analizi la evoluon de la lingva politiko de Vjetnamio ekde la jaro 1945 ĝis la nuna tempo, fokusante je stabileco kaj adapta laŭgradismo. Post-sendependecaj reformoj, kiel ekzemple la Nacia Alfabetiga Kampanjo, forigis koloniismajn skribsistemojn kiel ekzemple Chữ Nôm karaktrojn, antaŭenigante lingvan unuecon sed rompante kulturan kontinuan. Postaj fazoj, inkluzive de lingvaj purigo kaj normigo, emfazis laŭstadiajn alĝustigojn, harmoniigante naciismon kaj tutmondismen. La reformoj Đổi Mới de 1986 donis prioritaton al la angla por ekonomia integriĝo kaj dume marĝenigis minoritatajn lingvojn per dulingva klerigado. La politikoj de Vjetnamio montras padodependon je koloniaj kaj naciismaj heredaĵoj dum tiuj politikoj strategie adaptiĝas al tutmondaj premoj. Laŭstadiismo ebligis regatajn re-

formojn, konservante socipolitikan koheron per dominigo de la vjetnama lingvo sed kun samtempa atento kontraŭ fortriviĝo de minoritataj lingvoj. Tia aliro defias duflankajn komprenojn de postkolonia politiko, montrante ke laŭstadiaj alĝustigoj harmoniigas kulturen suverenecon kun tutmondismo. La studo emfazas la valoron de laŭstadiismo por kunordigi multlingvajn sociojn, kaj ĝi proponas saĝajn atentigojn por nacioj kiuj frontas lingvan malegalecon kaj kulturen konservadon ene de tutmondiĝo.

- Takunori Terasawa: *English language education as public and education policies: Critical evaluation of Japanese cases*

Anglalingva edukado kiel publikaj kaj edukaj politikoj: Kritika taksado de japanaj kazoj

Tiu ĉi referaĵo substrekas la bezonon de specialigita kadro por esplorado pri politikoj de EFLE (edukado per la angla kiel fremda lingvo), ĉar ekzistantaj modeloj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado (LPP) estas tro larĝaj por adekvate kapti la speciojn de EFLE. La referaĵo asertas, ke EFLE dividas pli da fundamentaj antaŭsupozoj kun publika kaj kleriga politiko – kio substrekas la neceson de analizaj kadroj speciale adaptitaj por la politiko de EFLE. Ĉerpante el kazostudoj el Japanio, la referaĵo prezentas tri rekomendojn. Unue, fakuloj konceptu EFLE-politikon kiel formon de lernejeduka politiko kaj zorge atentu la jurajn, administrajn kaj socihistoriajn limigojn enkonstruitajn en lerneajn sistemojn. Due, ili konsideru la formaligitan karakteron de la politikaj procedoj de EFLE, kiuj entenas ne nur mallongedaŭrajn pritraktojn sed ankaŭ longedaŭrajn dinamikojn inter, kaj ene de, ministerioj. Trie, esploristoj pri la politiko de EFLE rekonu la esencan rolon de dokumentoj en lokaj lingvoj kaj evitu troan dependon je fontoj en la angla lingvo.

- Jorge Antonio Leoni de León: *La inteligencia artificial en interlingüística : ¿una puerta abierta a la diversidad o a la homogeneización?*

Artefarita Intelektio en Interlingvistiko: ĉu malferma pordo al diverseco aŭ al homogenigo?

La ekapero de la Artefarita Intelektio transformis edukadon, publikan vivon, komunikadon kaj sciencon. Tio starigas la defion atingi justan kaj inkluzivan komunikadon, el interlingvistika vidpunkto, en kunteksto kie AI regas, impulsita de transnaciaj entoj, kiuj ofte antaŭenpuŝas regresajn sociajn politikojn. Tial, studo pri la eblaj karakteroj de rilatoj inter interlingvistiko kaj AI estas realigita kadre de la Celoj por Daŭripova Evoluigo (SDG-oj) de Unuiĝintaj Nacioj, kiu permesas kompreni la immanentajn riskojn en la teknologio kaj la novajn eblojn, kiujn ĝi disponigas. La uzo de AI en multlingvaj komunikaj medioj implicas ties konsideron, kiel solvon de malegalecoj en internacia komunikado; tamen, tiu eblo estas forĵetita, ĉar ĝi eksterigas komunikadon kaj subfosas teknologian suverenecon. Malgraŭ tio, ekzistas granda potencialo de AI en interkultura datena minado, konservado de minoritataj lingvoj kaj lingvoplanado, kio estas elprovita per esplora sperto surbaze de Esperanto kaj AI-modelo. La sukceso de la integriĝo de interlingvistiko kaj AI dependos de inkluziva kaj konscia vizio respektanta kulturen diversecon.

- Hossein Davari & Saeed Nourzadeh: *Recenzo de «Kristof Savski, 2024. Language Policy in Action».*
- Xiaolan Gu, Wanshu Qiao, Xiaofei Zhao & Yushu Wu: *Recenzo de «Bridget Goodman*

& Brian Seilstad (Red.). 2025. Conceptual and methodological failures, struggles and success».

5.3 *Esperantologio / Esperanto Studies*

5.4 *Investigationes Linguisticae*

5.5 *Beletra Almanako*

5.6 *Literatura Foiro*

6 NOVAĴLETEROJ

6.1 *Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)*

IpI estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.

Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.

Estraro de CED

**Mark FETTES (direktoro) ♦ Guilherme FIANS ♦ Klaus SCHUBERT
Humphrey TONKIN ♦ Michele GAZZOLA.**